Červen — Junio 1904 Nro 6

ROČNÍK II
JARO II

ČESKÝ ESPERANTISTA

Měsíčník pro šíření pomocného jazyka mezinárodního



ORGÁN

»Rakouského spolku Esperantistů« v Brně a »Klubu Esperantistů« v Praze.

ORGANO

de »Aŭstria societo Esperantista« en Brno kaj de »Klubo Esperantista« en Praha.



Redaktor české části:
KRUMPHOLC JOS.

Redaktoro
de l' parto Esperanta:
ČEJKA TH.



OBSAH:
ENHAVO:



Redakcio & administracio:
BYSTŘICE-HOSTÝN
Moravio, Aŭstrio.

Roční předplatné 3 K.
Jara abono 3·50 fr.

Číslo po 40 h.
Nro po 45 cent.

Členové spolku Brněnského i klubu Pražského dostávají „Č. E.“ zdarma.

ČESKÝ ESPERANTISTA

Monata gazeto por la propagando de Esperanto. Estas eldonata en kajeroj 16-paĝaj.

Nepresitajn manuskriptojn la redakcio redonos, se oni aldonis poŝtan markon por la resendo. — Poŝtaj markoj (kiel abonpago) estas akceptataj nur por $^3/_4$ de ilia valoro.

Represo kaj eĉ traduko de ĉiuj artikoloj estas permesita, sed sub jenaj kondiĉoj: 1. Citi nian gazeton. 2. Sendi al la redakcio 3 ekz. de tiu presaĵo, en kiu troviĝas la artikolo aŭ traduko.

Por ĉiu respondo, kiun oni deziras ricevi de la redakcio aŭ administracio, estu aldonita poŝta marko aŭ karto.

TELEFONO DE REDAKCIO.

Všem příznivcům našim! Hodláme občas otisknouti v »Č. E.« obecně zajímavé a poučné úryvky z esperantských dopisů přátel našich. O nemalém významu takového »klasobraní« nebude as nikdo pochybovati. Žádáme tudíž všech svých příznivců o laskavé příspěvky pro zamýšlenou onu rubriku. Ani nepatrné drobty nezůstanou nepovšimnuty. — Psáti račte jen po jedné straně papíru.

Al s-o **Konst. Efremov**, Sumi, Rus.: Vian interesan klarigon ni ricevis kun koraj dankoj kaj ni uzos ĝin tre bone. — S-o **Fr. Svačina**, Čes. Bud.: Via anonco en O. K. venonte. Se eble, skribu pli ofte. — Al s-oj **Balík**, **Sentis** kaj **Aymonier** en Grenoble korajn kaj sincerajn »resalutojn«! — S-o **Dro Melckebecke**, Antverpeno: Alsendita artikoleto ŝajnas al ni por plimulto de niaj legantoj tro specialista; sed similaj artikoloj komune interesaj kaj pli populare verkitaj estas de ni ĉiam volonte akceptataj. — S-oj **Joh. Schröder**, Vieno kaj **Krulj**, Mostaro: Viaj artikoloj plaĉas al ni; ni publikigos volonte. Daŭrigu! — Al **malpaciencaj atendantoj**: Ĉar ni havis tro multe da neprokrastebla materialo, ni devis prokrasti publikigon de prova paĝo el preparata detala vortaro boheme-esperanta (kvankam tiu provaĵo estas jam kompostita) ĝis unu el numeroj venontaj. — S-o **B-r**, Kozl.: Tradukojn el verkoj de Machar ni vidus tre volonte, sed alsenditaj provoj al niaj multaj legantoj eksterlandaj ne estus kompreneblaj sen detala historia antaŭparolo. Provu traduki pli internaciajn pecojn el »Golgata«. — **Hol.**: O »Kal. M. Čten.« víme. Může působiti velmi dobře. Příště. — **Memoru**: Ke vi ne povas, oni pardonos vin, sed neniam, ke vi ne volas. — **K-š**: Recenzon baldaŭ. Pri Vizov. skribu mem. — **Zig.**: Esprimo »Mi ne povas« estas por frenezuloj — diris Napoleono.

Nro 6. de »Č. E.« ree malfruiĝis, sed tiu ĉi foje pro unu el redaktoroj, kiu dum kelka tempo preskaŭ tute nenion povis labori en nia afero. Ĉu redakcio kaj ni ĉiuj entute ĉiam havas ĉion en niaj manoj? Kiu provis, tiu ne juĝos nin severege kaj estos pardonema. Niaj penadoj celos al rebonigo. Ĉu ili prosperos, montros estonteco.



JE-LI JAZYK MEZINÁRODNÍ MOŽNÝ?

ĈU LINGVO INTERNACIA ESTAS EBLA?

Výňatek z řeči *L. de Beaufronta* na kongresu spolku »Association Française pour l' Avancement des Sciences« v Paříži 1900.[1]

Nyní přijdeme k otázce druhé: »Je-li jazyk mezinárodní možný?« Také o tom žádný nepředpojatý člověk ani minutu nemůže pochybovati, poněvadž nejen není ani nejmenšího faktu, jenž by *odporoval* této možnosti, ale není ani nejmenší příčiny, jež by nutila byť i minutu *pochybovati* o možnosti takové. Jsou, pravda, lidé, kteří s vědeckou jistotou tvrdí, jako by jazyk byl něco přirozeného, organického, závislého od zvláštních fysiologických vlastností mluvidel každého národa, od podnebí, dědičnosti, křížení se plemen, historických podmínek atd. A davu takové řeči učené velmi imponují, zvláště jsou-li dostatečně propleteny rozličnými citáty a zástupům nejasnými výrazy technickými. Vzdělanec však, který odváží se míti svůj úsudek, ví zajisté zcela dobře, že vše to jest jen prázdný pavědecký tlach, který nemá nijakého smyslu a jejž odraziti bylo by lze prvému namanuvšímu se dítěti. Z denní zkušenosti všichni zajisté víme zcela dobře, že vezmeme-li dítě z kterékoli země nebo národa a budeme je ode dne narození jeho vychovávati mezi osobami národa úplně cizího a třeba i jemu protichůdného,

Nun ni transiros al la dua demando: »ĉu lingvo internacia estas ebla?« Ankaŭ pri tio ĉi nenia senantaŭjuĝa homo eĉ unu minuton povas dubi, ĉar ne sole ne ekzistas eĉ la plej malgrandaj faktoj, kiuj parolus *kontraŭ* tia ebleco, sed ne ekzistas eĉ la plej malgrandaj kaŭzoj, kiuj devigus eĉ unu minuton *dubi* pri tia ebleco. Ekzistas en efektiveco homoj, kiuj kun scienca aplombo kredigas, kvazaŭ lingvo estas objekto natura, organa, kiu dependas de apartaj fiziologiaj ecoj de la organoj de parolo de ĉiu popolo, de la klimato, heredeco, kruciĝado de rasoj, historiaj kondiĉoj k. t. p. Kaj al la amaso tiaj instruitaj paroloj tre imponas, precipe se ili en sufiĉa mezuro estas traplektitaj per diversaj citatoj kaj per misteraj por la amaso terminoj teĥnikaj. Sed homo klera, kiu kuraĝas havi propran juĝon, scias ja tre bone, ke ĉio tio ĉi estas nur senenhava pseŭdo-scienca babilado, kiu havas nenian sencon kaj kiun rebati povus tre facile la unua renkontita infano. El la ĉiutaga sperto ni ĉiuj ja scias tre bone, ke se ni prenos infanon el kiu ajn lando aŭ nacio kaj de la tago de ĝia naskiĝo edukados ĝin inter personoj de nacio tute fremda kaj eĉ antipoda por ĝi, ĝi parolados en la lingvo de

---

[1] Dr. L. Zamenhof: »Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto«. Paris, Hachette et Cie, Boulevard Saint-Germain, 79. 1903. — str. 279.—281.

ono bude mluviti jazykem tohoto národa právě tak dokonale a čistě, jako každý přirozený syn toho národa. Je-li pro člověka *dospělého* zpravidla nesnadno naučiti se jazyku cizímu, nepochází to zajisté z ústrojí jeho mluvidel, nýbrž prostě odtud, že nemá trpělivosti, že nemá času, učitelů, pomůcek atd. Týž dospělec setkal by se zajisté s týmiž nesnadnostmi při učení se svému *domácímu* jazyku, kdyby v dětství nebyl v něm vychován a měl se mu učiti pomoci úloh. Posléz každému vzdělanému člověku jest zajisté i nyní učiti se několika jazykům cizím a nevolí zajisté těch, jež jsou jakoby přiměřené mluvidlům jeho, nýbrž jen ty, jichž *potřebuje;* není tudíž nic nemožného v tom, kdyby všichni místo rozličným učili se témuž jazyku a tak mohli se dorozumívati vzájemně. Kdyby i každý neovládal společného jazyka zcela dokonale, přece byla by tehdy otázka jazyka mezinárodního již rozhodnuta a lidé přestali by stavěti se proti sobě jako hluchoněmí. A mělo by se pamatovati, že kdyby všude bylo známo, že pro styky s celým světem je nutno naučiti se jen *jedinému* jazyku — že všude bylo by dostatek dobrých učitelů tohoto jazyka, zvláštních škol, že každý učil by se tomuto jazyku s chutí a horlivostí, a posléz by i všichni rodičové přivykali dítky své tomuto jazyku již *v dětství* zároveň s jazykem mateřským. Nechajíce tudíž zatím stranou otázku o tom, budou-li lidé *chtíti* zvoliti si někdy jeden jazyk za jazyk mezinárodní a podaří-li se jim shodnouti se u volbě jeho, konstatujeme zatím ten fakt, jenž zcela nepochybně následuje ze všeho co jsme nahoře pověděli,

tiu ĉi nacio tiel same bonege kaj pure, kiel ĉiu natura filo de tiu ĉi nacio. Se por homo maturaĝa estas ordinare malfacile ellerni fremdan lingvon, tio ĉi ja tute ne venas de la konstruo de liaj organoj de parolo, sed simple de tio, ke li ne havas paciencon, ne havas tempon, ne havas instruantojn, ne havas rimedojn k. t. p. Tiu ĉi sama maturaĝulo renkontus ja tiujn ĉi samajn malfacilaĵojn ĉe la ellernado de sia *hejma* lingvo, se li en la infaneco ne estus edukita en tiu ĉi lingvo, sed devus ellernadi ĝin per helpo de lecionoj. Fine ĉiu klera homo ja ankaŭ nun *devas* ellernadi kelkajn fremdajn lingvojn, kaj li certe ne elektas tiujn lingvojn, kiuj kvazaŭ estas konformaj al liaj organoj de parolo, sed nur tiujn, kiujn li *bezonas;* estas sekve nenio neebla en tio, ke anstataŭ ke ĉiu lernas *diversajn* lingvojn, ĉiuj ellernadu *unu saman* lingvon kaj sekve povu komprenadi unu alian. Se eĉ ĉiu posedus la komune akceptitan lingvon ne en plena perfekteco, eĉ tiam la demando de lingvo internacia estus jam decidita kaj la homoj ĉesus staradi unu antaŭ alia kiel surda-mutaj. Kaj oni devas ja memori, ke se ĉie estus sciate, ke por komunikiĝoj kun la tuta mondo oni devas ellerni nur *unu* lingvon — ĉie ekzistus multego da bonaj instruistoj de tiu ĉi lingvo, da specialaj lernejoj, ĉiu ellernadus tiun ĉi lingvon kun la plej granda volonteco kaj fervoreco, kaj fine ĉiuj gepatroj alkutimigadus siajn infanojn al tiu ĉi lingvo en la *infaneco*, paralele kun la patra lingvo. Sekve lasante dume flanke la demandon pri tio, ĉu la homoj *volos* elekti iam unu lingvon por la rolo de internacia kaj ĉu prosperos al ili veni al interkonsento pri tiu ĉi elekto, ni dume konstatas tiun fakton, kiu kun plena sendubeco sekvas el ĉio, kion ni diris supre, nome, ke la *ekzistado mem* de lingvo inter-

zejména že existence jazyka mezinárodního sama o sobě jest zcela možna. Zapamatujte si tedy dobře tyto dva nepochybné závěry, k nimž jsme posud byli došli, totiž:


1. Jazyk mezinárodní přinesl by lidstvu obrorský prospěch[1];

2. Existence jazyka mezinárodního jet docela možna.

nacia estas tute ebla. Notu do al vi bone en la memoro tiujn du sendubajn konkludojn, al kiuj ni venis ĝis nun, nome:

1. Lingvo internacia alportus al la homaro grandegan utilon;

2. La ekzistado de lingvo internacia estas plene ebla.



KONGRESO DE VIRINOJ. APOTEOZO DE PACO[2].

Movado virina fariĝas konstante pli kaj pli granda per siaj veremeco kaj seriozeco. Ne estas ludo de vanteco, kio hodiaŭ plenigas la animon de virinoj; ĝi estas serioza, vera sopirado en universala batalado por spiritaj havoj esti valora kunaganto apud viroj kaj kun viroj. Malsupereco de l' virino, jen vidopunkto hodiaŭ venkita, kaj la virinoj en batalado por rajtoj kaj indeco homa pruvis plenmezure sian egalvaloron kaj inteligentecon.

Kun egala ideala entuziasmo kaj flameco kiel viroj, egale principe kaj serioze ili partoprenas en ĉio, kio rilatas al homo, al ĝia vivo, kio rilatas al societa penado por atingi liberecon, libereco de individuo kaj levi nivelon kulturan kaj moralan. Ilia agado povas krei miraklojn de nobligo kaj moraligo.

En kongreso de virinoj, kiu ĵus finiĝis en Berlino, grandnombre partoprenis delegatinoj de preskaŭ ĉiuj nacioj, ankaŭ bohemaj. Penado atingi egalrajton kaj aliaj postuloj, pri kiuj traktis la kongreso, ne estas tiom gravaj kiel tio, kio jam fariĝis ekster programo de kongreso, kaj estis — mi dirus — pli alta, demonstracio por la tutmonda paco. Per iniciativo de societo de paco estis en vendredo kaj sabato (la 10. kaj 11. de junio) kolektiĝo, kian Berlino ofte ne vidas. En ĝi parolis maljuna Susana Anthony por Ameriko, Bertha de Suttner, grafino Aherdeen (Anglino), Lina Morgenstern k. t. p.

La ĉefa punkto de kunveno dum ambaŭ tagoj estis parolado de Bertha de Suttner pri milito, paco kaj virina movado. La parolantino bonege plenumis sian rolon. Kaŭzojn de milito (unu naskas alian, por interesoj


[1] Viz »Č. E.«, str. 95.
[2] Vidu »Čas«, Nro 163. (14. IV. 1904).

fremdaj, nekonataj) kaj ĝiajn pereigajn efikojn ŝi priskribis en koloroj tre trafaj. Milito estas la plej granda malfeliĉo, kiun la homaro preparis al si, ĝi estas supriĝo de perfortemo, barbareco. Genio de paco kovras sian vizaĝon, li ploras, ke en malproksima oriento ree mortigas sin niaj fratoj, ĉu Rusoj ĉu Japanoj, ĉiuj homoj estas inter si fratoj. Pereigo de ŝipo ĉe Port Arthur faris grandan malfeliĉon; pereis kun ĝi homo-artisto, kies peniko tiel majstre sciis prezenti la terurojn de milito, pereis homo, apostolo de paco. Caro estas pacama, sed li estis ĝisdevigita al milito. La militarista partio ĝojegas, ĝia idealo militi estas plenumita. Pri paco ili diras, ke ĝi malutilas kuraĝecon kaj humanecon. Milito instruas homon al heroeco. La militarista partio venkis por momento amikoj de paco, ĉie ja oni armigas — eĉ en mia patrujo, diras la parolantino, oni permesis al registaro ĉirkaŭ 400 milionoj da kronoj por armilaro. Kiu estas kulpa, ke milito ĝis nun ne estas neebligita? Nek la militantaj partioj, nek militarismo, sed ni ĉiuj, kiuj estas indiferantaj, ni, virinoj, kiuj siajn infanojn edukas en spirito de militarismo, siajn infanojn sendas en kadetajn lernejojn k. t. p. Kultura evolucio iras de perforto al rajto, al justeco, kulture progresanta homaro starigas al si aliajn celojn sur fundamentoj celantaj al bonigo de cirkonstancoj socialaj kaj moralaj, forigas ĉiujn malhelpojn, kaj forigos iam eĉ verŝadon de senkulpa sango — ĉiun militon.

Ideo de paco ricevis en tiuj ĉi tagoj grandan fortigon, konsenton de virinoj kaj tio signifas multe.

La parolantinoj, precipe B. de Suttner, estis objektoj de grandaj entuziasmaj ovacioj. La kunvenoj estis grandnombrege vizititaj; centoj da homoj venis kaj vane atendis ekstere la alvenon de la virinoj, al kiuj apartenas por meritoj pri sia movado kaj movado de viroj tuta honoro.

H.



MISTR JAN HUS † 6. VII. 1415.

Mi petas, amu vin reciproke, ne permesu bonajn homojn perforti kaj veron al ĉiuj deziru.

*


Persistu en ekkonita vero, kiu super ĉio venkas kaj fortega estas ĝis eterne.

VASIL VASILJEVIČ VEREŠČAGIN

mortis — kiel oni scias — dum pereo de l' rusa milita ŝipo »Petropavlovsk«. Kun li foriras homo simila al Tolstoj en nobla penado malplaĉigi la militon. Kiel Tolstoj al tiu celo dediĉis siajn eminentajn verkojn, tiel Vereŝĉagin eminentajn ellaboraĵojn de sia peniko. Jam de la jaroj sepdekaj li pentradis por eternaj memoro kaj averto la kruelaĵojn kaj terurojn de militoj por abomenigi tiajn solvojn de internaciaj disputoj kaj por rememorigi eblecon de konsentiĝo en paco. Li pripentras la rusan militiron en Turkestanon, amasojn da kranioj en ĝi forhakitaj, la Hindojn alligitajn antaŭ buŝoj de anglaj kanonoj, turkajn kaj rusajn masbuĉojn en milito de tiuj ĉi du nacioj sur Balkano, grandegan vicon da suferoj kaj mizeroj de militistaroj en ciklo napoleona, nehumanaĵojn de bura milito kaj nun ree li volis al tiuj ĉi dokumentoj de homa besteco aldoni novan, militon ruso-japanan. Por tiu senlaca penado, per kiu li volis la homaron konsciigi pri sango, brulado kaj larmoj, la sendisiĝa triunuo de tiu ĉi frenezaĵo de registaroj, por tiu penado li estis honorita eĉ per premio de Nobel ĉiujare donata al eminentaj laborantoj de paco. Mano en mano kun tiu ĉi alta kompreno de sia tasko[1] iris ankaŭ aliaj opinioj vivadaj: je malhonoro de rusa registaro Vereŝĉagin pentris ankaŭ ekzekutojn de nihilistoj pendigataj aŭ pafataj inter kordonoj de schüsselburga militistaro; Kriston li komprenis kiel Kriston de malriĉaj, kompatulon kaj persekutaton de leĝistoj kaj li pentris lin kaj lian familion kun realismo, kiu vekis teruron en ĉiuj, kiuj malĝuste havas lian nomon en parolo kaj en koro. Ĉe la ekspozicio de liaj ellaboraĵoj en Vieno en j. 1881 samtempe estis eldonitaj ĉefepiskopa malpermeso por kredantoj kaj milista por soldatoj, ke sub severaj punoj ili ne vizitu lian ekspozicion. Kaj kiam estis proponitaj al li honoroj, titoloj, oficoj kaj ordenoj, ĉiam rifuzis ilin tiu granda homo, kiu volis nur kaj sole resti batalanto de siaj puraj ideoj. De la sepdekaj jaroj de pasinta centjaro li rapidis sur ĉiujn scenejojn de militoj por denove kolekti pruvojn por ideo de paco, kaj jen, kiam tiu ĉi malamiko de milito eble por terurigi tutan homaron kaj por veki ĝian konsciencon, preparas sin prezenti antaŭ ĝiajn okulojn novajn flankojn

[1] Úkol.

de ĝia besteco, li falas tombon kvazaŭ per venĝo de sia kontraŭulo-milito por li preparitan . . . Kia tragiko! Kia perdo ne nur por Rusujo, sed por tuta civilizita mondo! Malĝojo falas sur koron ĉe tiu penso, sopiro kaj bedaŭro peza; kaj se io malhelpas ilian malmolan kaj plenan alpremon, estas tio nur ekpenso, ke homo estas nur ilo de ideo kaj ke super falintaj defendantoj vivas eterne kaj sendetrueble, ĝis plena sia venko iliaj ideoj. *Trad**



TVORBA SLOV V ESPERANTĚ PŘÍPONAMI.

Píše *Josef Krumpholc.*

(Ostatek.)

-ilo jest ruské -ilo, obdobné s naším -dlo (původně -lo) ve slovech: kropilo, kropidlo, *ŝprucilo;* merilo, měřidlo (míra), *mezurilo;* černilo, černidlo, *nigrilo;* mazilo, mazadlo, *ŝmirilo;* kormilo, kormidlo, *direktilo;* udilo, udidlo, *haltigilo;* motovilo, motovidlo, *volvilo* atd.[1] Vyskytuje se ve jménech nástrojů a prostředků, jako: *plugilo* pluh, *ĉerpilo* čerpadlo, *flugilo* křídlo, *kaptilo* chytadlo, past, osidlo; *logilo* lákadlo, *muelilo* mlýn, *naĝilo* ploutev, *glitilo* brusle, *irilo* chůda, *levilo* páka, *fermentilo* kvasidlo, *vomilo* davidlo atd.

-ulo (obdobné s latinským -ulus, ruským -ula: bibulus, piják, *trinkulo;* borodula, bradáč, *barbulo* atd.) karakterisuje osoby dle význačné jich vlastnosti.[2]

Příklady. *Junulo* mladík (osoba vyznačující se mládím), *maljunulo* stařec, *avarulo* lakomec, *malvivulo* umrlec, *timulo* bázlivec, *frenezulo* šílenec, *fortulo* silák, *grandegulo* obr, *nigrulo* černoch, *antaŭulo* předchůdce, *riĉulo* boháč, *strabulo* šilhavec, *miopulo* krátkozraký člověk, *blindulo* slepec, *krimulo* zločinec atd.

-ĉjo (z ruštiny) připojeno ke 2. nebo ke 3., 4. nebo 5. hlásce křestního jména mužského, zdrobní je: *Petro* Petr-*Peĉjo* Petříček; *Miĥaelo – Miĉjo* Michálek; *Joĉjo* Jeník, *Jozefĉjo* Jozífek atd.

-njo (z ruštiny) zdrobňuje podobně jako *-ĉjo* křestní jména ženská: *Mario—Manjo* Mařenka, *Emilio—Eminjo* Emilka, *Julinjo* Julinka, *Bonjo* Boženka, *Sofinjo* Žofinka atd.

---

[1] *V. Laskin* »Skizoj gramatikaj«, *Lingvo internacia* roku 1896, str. 201—203.

[2] Srovnej s příponou -aĵ- »Č. E.« II. str. 9.

Jak z celého článku našeho patrno, není Esperanto pouhým výmyslem slepé zvůle, nýbrž vpravdě důmyslným a velkolepým plodem kritického, uvědomělého výběru, dílem, k němuž jak látkou tak formou přispěl celý civilisovaný svět. I uskutečnila se jím krásná myšlenka našeho Jana Amosa Komenského, již podivuhodný veleduch tento vyslovil v nedoceněném posud ač nejdokonalejším[1] filosofickém spise svém »Via lucis« (Cesta světla) z roku 1641, v němž — obíraje se myšlenkou akademie světové — radí, by pěstování vševědy svěřilo se pilným a mnohým mužům moudrým, kteří by vzájemně o sobě věděli a vespolek jazykem obecným se dorozumívali, kterýž k tomu cíli měl býti ovšem teprve utvořen a to »návodem buď jazyků již známých nebo věcí samých.« A pokračuje: »Prvého způsobu příkladem byl by Zeuxis, jenž Helenu malovati chtěje, kázal si přivésti panny vzrůstu znamenitějšího, kolik jich možná bylo sehnati, a všecko při všech prozkoumav pečlivě, který úd při některé nad jiné vynikati viděl, ten přenesl na svou Helenu, a tím

[1] Viz »Českou Mysl« r. 1900, str. 263.

Kiel el la tuta artikolo estas evidenta, Esperanto ne estas nur elpensaĵo de blinda arbitreco, sed vere saĝa kaj belega frukto de kritika, konscia elekto, ellaboraĵo, al kiu tiel per materialo kiel per formo kunhelpis tuta civilizita mondo. Kaj efektiviĝis per ĝi la bela ideo de nia Jan Amos Komenský, kiun tiu admirinda genio esprimis en sia ĝis nun ne plenŝatita kvankam la plej perfekta[1] filozofia verko »Via lucis« (Vojo de lumo) el jaro 1641, en kiu — okupante sin per ideo de tutmonda akademio — li konsilas, ke la pansofio estu studata de diligentaj kaj multaj saĝaj viroj, kiuj sciu pri si reciproke kaj kompreniĝu inter si per komuna lingvo, kiu devis por tiu celo unue esti kreita »aŭ laŭ la lingvoj jam konataj aŭ laŭ aferoj mem«. — Kaj li daŭrigas: »Ekzemplo laŭ la unua modo estus Zeuxis, kiu intencante pentri Helenon, ordonis alkonduki la virgulinojn de plej bela kresko, kiom da ili oni povis trovi, kaj ĉion ĉe ili ĉiuj zorgeme esplorinte, kiun membron ĉe iu li vidis superi, tiun li transportis sur sian Helenon kaj tiamaniere li feliĉe esprimis la ideon de la plej supera


[1] Vidu »Česká Mysl«, jaro 1900, pĝ. 263.

způsobem nejsvrchovanější sličnosti ideu nějakou štastně vyjádřil. Podobného něco i tady státi by se mohlo, kdyby cokoli který jazyk má zvláště jadrného, ozdobného, důrazného (sotva pak který tak nešťasten jest, aby něco zvláštního před jinými neměl), všecko to odevšad sebráno a v jeden ten jazyk harmonicky sneseno bylo, aby z mnohých líbezností stala se jedna, však líbezností quintessence.«[2]

A tak se i stalo. Pravda, přes 240 let bloudila a hledala idea našeho Komenského svého Zeuxise, ale našla ho přece. A Zeuxis ten? — Toť Dr. Zamenhof — a Helena? Toť dílo jeho – Esperanto.

beleco. Io simila ankaŭ tie ĉi povus fariĝi, se ĉion, kion iu lingvo havas precipe esprimeman, ornaman kaj energian (dubeble iu estas malfeliĉa ne havi apartajn superaĵojn) ĉio tio de ĉie estus kolektita kaj en tiun unu lingvon harmonie kunmetita, ke el multaj belaĝoj fariĝu unu, sed de belaĵoj kvintesenco«.

Kaj tiel ankaŭ fariĝis. Vere, pli ol 240 jarojn vagis la ideo de nia Comenius kaj serĉis sian Zeuxison, sed ĝi tamen lin trovis. Kaj tiu Zeuxis? — Jen Dro Zamenhof — kaj Heleno? Jen lia ellaboraĵo — Esperanto.



VOJAĜO TRA „ESPERANTUJO“.

Rememoroj el jaro 1903 de *Ed. Kühnl.*

Apenaŭ matene ektagiĝis, mi estis jam ĉe bordo de lago kaj rigardis la blankajn kapojn de alpaj montegoj; dufoje mi tien revenis, ne povante liberiĝi de penso, ke mi devas forlasi la belan urbon, al kiu ligis min eĉ volo, denove kaj denove kunveni kun amataj amikoj kaj babiladi kun ili en »mia nun gepatra« lingvo Esperanto. Tamen atendis min eĉ alie pli multaj samideanoj, kiuj, kiel mi antaŭsentis, same estos al mi karaj. Estis al mi necese kunfratiĝi kun proverbo: »Nenio eterna«.

Post la 10ª horo mi ekveturis jam al Lyon. Por tiu ĉi tago mi decidis ektrovi konvenan loĝejon kaj ripozi,

[2] Fr. J. Zoubek »Život Jana Amosa Komenského.« V Praze 1892, str. 134-5

ĉar vigleco kaj bona humoro staras la unuaj en vico de bonaj ecoj; tiel mi almenaŭ supozas.

La tagon sekvantan mi havis honoron kunveni kun s-o Dro Dor. En sia loĝejo li akceptis min tre dankinde kaj, ĉar la saman tagon li estis okupita, ni elektis la morgaŭon por la ekskurso al s-o Bois. Posttagmeze mi klopodis viziti ankoraŭ aliajn esperantistojn en Lyon, sed preskaŭ neniun mi trafis hejme. S-o prof. Offret, kiun mi multe ĝojis vidi, forveturis tiutempe, kiel oni diris al mi, en nian urbon Praha.

Ĵus veninta dimanĉo estas unu el plej ofte rememorigataj tagoj. Jam je la 9ª horo matene mi kunvenis kun s-o Dro Dor en stacidomo de St. Paul, por veturi al s-o Bois, kiu atendis jam nian alvenon en stacidomo de St. Laurent de Chamousset. Hejme bonvenis nin lia familio, en kies rondo ni ĝuis tagmeze gastigon neforgeseblan. Mi bedaŭras, ke tempo tute malpermesis al ni pli longan restadon kaj ke jam la saman tagon ni devis ekmarŝi al stacidomo. Dum vojo mi tre agrable amuziĝis kun la juna filineto de s-o Bois; ŝi senpene esprimadis per Esperanto ĉiun penson, tial estis nia parolado fluanta, kvazaŭ ĝi ne estu en lingvo artefarita.

Vere kortuŝis min la disiĝo kun familio Bois, kiu montris senkaŝe ĝojon pri okazo paroli la unuan fojon kun fremdulo — esperantisto. Revenante mi voje haltiĝis kun s-o Dro Dor en stacio Charbonièrs les Bains, ĉar ni esperis trafi hejme s-on Dron Hugot. Sed, ne povinte nian viziton anonci pli frue, ni ne trovis lin. Post bona vespermanĝo ni revenis vespere Lyon'on. Volante tamen viziti s-on Dron Hugot, mi elveturis denove la duan tagon al li kaj nun estis nur feliĉa okazo, kiu kunkondukis nin en telegrafa oficejo. Ĝis vesperon ni kune promenadis en ĝardeno de baneja restoracio, vizitis eĉ la bandomon, teatron kaj salonon, en kiu staras du verdaj tabloj – altaroj, sur kiuj oni facilanime oferadas feliĉon kaj kontentecon: ĝi estas ludejo de »ruleto«.

Ĉar mi estis invitita al vespermanĝo en loĝejon de s-o Dro Dor, mi devis la saman tagon reveni Lyon'on. —

Ĉe pordo de lia domo mi kunvenis kun s-o prof. Touchebeuf, kiu ankaŭ estis invitita por partopreni dum vespero, kiel eĉ s-o prof. Blanc el Roma. La tutan


vesperon estis Esperanto nia sola kompreniĝilo. Vizitante ĉambrojn kaj salonojn de nia gastiganto, ni trovis okazon priparoli la plej diversajn objektojn — — kaj Esperanto ĉiam al ni sufiĉis.

Estis jam malfrue en la nokto, kiam ni eliris el domo de s-o Dro Dor.

Kun s-o prof. Touchebeuf mi kunvenis ankoraŭ la duan tagon, kiam ni veturis per biciklo al s-o Dro Hugot, kaj s-on prof. Blanc mi renkontis ankoraŭ dum plua vojaĝo.

La lastan tagon de mia restado en Lyon mi estis vizitita de s-o Bois, kiu ĝojante havi okazon esperante paroli, ne ŝparis tempon elserĉi min en hotelo. Sed same ankaŭ mi estis gajigita, kiam li afable klarigadis al mi la vidindaĵojn de Lyon, videblajn el supro de preĝejo, al kiu kondukis nin ŝnurega fervojo. Vidaĵo tie al mi prezentiĝinta, neniam malaperos el mia memoro, ĉar nenie mi trovis tian similecon koncerne la geografian situacion de du urboj, kiel ĝin posedas Lyon kun Praha, rilate la monton transriveran kun turo, preĝejo kaj fervojoj.

Ĉar s-o Bois ne povis forveturi kun vespera vagonaro, ni pasigis kune la vesperon kaj matene ni forveturis el Lyon. Li hejmen, mi en urbon Tarare, kie min atendis s-o Cherblanc. En rondo de lia familio mi havis la honoron tagmanĝi kaj posttagmeze mi vizitis kun li la klubejon esperantistan kaj kelkajn klubanojn . . . .



AL LA MORTO DE PUŠKIN.

De Miĥael Lermontov*.

(1837.)

Mortigis oni la poeton,
lin kalumniis nigra fam',
restigis homan societon

* Lermontov estis glora rusa poeto. Post tiam, kiam unu kortegano mortigis en duelo alian gloran rusan poeton Puškin, Lermontov en indigno skribis versaĵon »Al la morto de Puškin«. Ĉar laŭ tiu tempo la versaĵo estis tro kuraĝa, Lermontov estis ekzilita Kaŭkazon. Sur Kaŭkazo li verkis »Kanton pri reĝo Johano Vasiljič«. La poemo havas transportan sencoj. kaj povis esti unuan fojon presita nur sub pseŭdonimo dank' al kio la transporta senco ne estis rimarkita.

li kun fiera venĝa flam'.
Ofendojn tedajn, malhonoron
ne povis jam toleri pli,
li iris kontraŭ mondan moron —
kaj mortigita estas li!
Jes, mortigita . . . Tial ploro,
praviĝoj estas nun sen cel',
kaj vana estas laŭda ĥoro —
de l' sorto batis la martel'!
Ja vi antaŭe longe pelis
talenton tian de liber'
kaj, por amuzo, vi akcelis,
ke fajru raste la fajrer' . . .
Nun gaju! . . . Ĉar li ne elportis
turmentojn lastajn en trankvil',
la kron' solena velke mortis,
kaj estingiĝis la lumil'! . . .
La mortiginto en trankvilo
direktis baton – savo for:
la man' ne tremas ĉe l' armilo,
ebene batas tiu kor'.
Fremdulojn multajn similanta,
por kapti rangojn plu sen tim',
li venis mem el malproksim'
de fat' ĵetita, aroganta
mokante, kiel fremdujan',
li malestimis fremdan moron,
li ne indulgis nian gloron,
li ne komprenis mortan horon,
en kiu pafis lia man'!

* * *

Pereis li kaj estas nun en tombo larma,
simila je l' kantisto nesciata, ĉarma,
akir' de muta ĵaluzem',
de li kantita kun mirinda forto varma,
kaj mortigita similante je li mem.
Kaj kial li de amikeco simplanima
elvenis al la mondo enviema, krima
por la pasioj flamaj kaj libera kor'?
Por kio iris li al homoj malsinceraj,
por kio kredis li al vortoj tre malkleraj,
li, homsciema de l' juneco en la glor'?


L' antaŭan kronon depreninte, la prunelan
sur lin kun laŭroj luksaj oni metis jam;
sekretigitaj pingloj do la helan
vundadis frunton en l' ornam' . . .
Venenigita estas lia lasta horo
de malkleruloj per intriga la parol',
li mortis kun dezir' de venĝo en la koro,
kun ĉagreniĝo akra de trompita rol'.
Silentas lia kanto lira,
ne sonos pli ĝi al orel',
l' estejo estas senelira,
la buŝon fermis la sigel'.

*

Vi, posteuloj tro fieraj
de patroj gloraj per malnobla far',
tredintaj[1] *per kalkanoj malliberaj*
la certan genton en posteular'!
Vi, avideme alestantaj ĉe la reĝo,
ekzekutistoj de genio kaj liber'!
Vi, kaŝas vin sub ombro de la leĝo,
kaj antaŭ vi silentu juĝo kaj la ver'!
Sed konfidatoj de malĉasto kaj malgloro,
minaca juĝo estas, ĝi atendas vin,
ne atingebla estas ĝi por oro,
kaj pensoj, faroj ne evitos ĝin.
Kaj tiam kalumnio vin ne savos,
ĝi vin ne helpos ree kiel or',
kaj vi per via nigra sango ne forlavos
de la poeto justan sangon for!

Siberio, Tomsk. Internaciigis Ivan Seleznjov.

Rimarko: La plej glora rusa poeto Puškin estis mortigita en duelo de unu kortegano Dantes Hekkern. Por la versaĵo Lermontov estis ekzilita el Peterburgo sur Kaŭkazon.



KRONIKO.

Sub redakcio de *J. Grňa,* Lipová-Dřevohostice. Moravio.

Čechy. Pan uč. *Vilém Šebor* ze Štěpánova u Vlašimi píše nám: Dne 9. června t. r. přednášel ve

Bohemujo. S-o *Vilém Šebor,* instruisto en Štěpánov-Vlašim sciigas al ni jenon: Bonan paroladon pri

[1] Tredi = šlapati = fouler = treten = to tread = toptatj = bati, albati per la piedoj al malsupro, al la tero.

schůzi učitelské jednoty »Budeč« ve Vlašimi kol. *Štěpán* o pomoc. řeči mezinár. »Esperantu«. Přednášející rozvinul před námi snahy různých myslitelů, sestaviti řeč mezinárodní a promluvil podrobně o mluvnici a slovníku esper. Posléze přeložil několik dopisů z Esperanta, by ukázal, jak snadno lze z Esper. překládati a jak lehce dají se myšlenky jím vyjádřiti. Přednáška vyslechnuta byla se zájmem a získala několik kolegů pro tuto krásnou ideu. Při společném obědě prohlíželi jsme dopisnice ze všech dílů světa došlé. — Pražský (denník) i týdenník »*Čas*« uveřejnil v čísle 24. (11. VI. 1904) dopisy inženýra Kazy Gireje z Port Arthuru. Pan Kazy Girej, inženýr tuhových dolů v Chabrinu, navštívil minulého roku Evropu, aby prohlédl si různé doly; dorozumíval se všude jen Esperantem. Nyní dlí v Port Arthuru ve službách »Červeného kříže«. V dubnovém čísle časopisu »*Lingvo Internacia*« uveřejnil Esperantem dva dopisy o životě a posledních událostech v Port Arthuru, jež do »Času« přeložil náš spolupracovník p. J. F. Khun. — *Vyučování Esperantu* zavedeno je na utrakvistickém (česko-německém) ústavě slepců v Praze. Esper. kurs koná p. Macan, učitel ústavu, jenž sepsal českou učebnici pro slepce písmem Braillovým. Již 22 chovanců ústavu pilně učí se Esperantu a rádi spolu rozmlouvají: slepci Čechové se svými kolegy německými. Dříve z příčin národnostních Čechové nechtěli mluviti německy a Němci česky. Vzájemné dorozumění mezi oběma národy bylo proto úplně nemožno. Esperanto však přetrhlo národnostní hráze a sbratřuje bývalé nepřátele. Ředitelství s povděkem pozorujíc změnu tuto, podporuje ochotně učení se Esperantu. (*K. H. B.*)

helpa lingvo internacia Esper. faris 9. VI. 1904 kolego *Štěpán* en kunveno de instruista societo »Budeč« en Vlašim. Parolanto disvolvis antaŭ ni klopodojn de diversaj pensuloj pri kreo de lingvo internacia kaj klarigis detale gramatikon kaj vortaron esper. Fine por pruvi, kiel facile oni povas esprimi pensojn per Esperanto kaj traduki el ĝi, li tradukis kelke da leteroj el Esper. Tuta parolado estis aŭskultita kun intereso kaj entuziasmigis kelkajn kolegojn por ĉi tiu bela ideo. — Ĉiutaga gazeto »*Čas*« publikigis en Nro 24 (11. VI. 1904) leterojn de inĝeniero Kazi Girej el Port Arthur. — S-o Kazi Girej, inĝeniero de grafitaj minejoj en Ĥarbin, vizitis Eŭropon en pasinta jaro por vidi diversajn minejojn kaj ĉie interkompreniĝis nur per Esper. Nune li loĝas en Port Arthur en servoj de »Ruĝa kruco«. En aprila Nro de »*Lingvo Internacia*« li publikigis du leterojn pri vivo en Port Arthur. Ĉi leterojn tradukis bohemen nia kunlaboranto, s-o J. F. Khun. — *Instruado de Esperanto* estas enkondukita en utrakvista (bohemagermana) instituto por blinduloj en Praha. Kurson faras s-o Macan, instruisto de ĉi tiu instituto; li verkis ankaŭ boheman lernolibron por blinduloj per Braillea sistemo. Esperanton lernas nun fervore 22 gezorgatoj de instituto; ĝoje interparolas blinduloj bohemaj kun siaj kolegoj germanaj. Antaŭe estis alie: bohemoj ne volis pro naciaj motivoj paroli lingvon germanan kaj germanoj lingvon boheman. Interkompreniĝo inter ambaŭ nacioj estis do neebla. Esper. forigis barojn naciajn kaj fratigas antaŭajn malamikojn. Direkcio de instituto ĝoje vidas tion kaj subtenas volonte lernadon de Esper. (*K. H. B.*)

Morava. *Ze Spolku Esperantistů v Brně.* Valná hromada bude se konati dne 12. července t. r. o 7½ hod. večer ve spolkové místnosti (Ferdinandská ul. 22.). — Denní pořádek: 1. Zprávy činovníků. 2. Volba výboru a revisorů. 3. Volné návrhy. — Výbor spolku navrhuje do příští správy spolkové tyto pány: Předseda: prof. R. Krejč; jednatel: Jan Kajš; pokladník: K. Steier; knihovník: B. Závada; přísedící: J. Kislinger, K. Knoflíček, J. Šterc, F. Dratva, Ed. Zatezky. Revisoři: Fr. Roháček, Jan Quitta, Ed. Němec. — Ctěné členstvo zve se tímto k účasti na této valné hromadě buď osobně nebo písemně (§ 6. stanov spolku).

J. Kajš, jednatel.

Anglie. O Esperantu přednášel p. C. Pearson v Newcastle a pan James Haxton konal kurs esper. ve St. Andrews, kde pak utvořil se klub esper. Četné časopisy píší o Esperantu, zejména »Review of Reviews«. — Firma *Hatchard & Castarede*, London, 79. High Holborn rozesílá nyní anglický a Esper. psaný oběžník, v němž oznamuje, že vydávati bude měsíčník »The Note Book« (Poznámky). Poněvadž každé číslo obsahovati bude dobré články esper., bylo by žádoucno hojně časopis ten předplatiti.

Bulharsko. Vyšel 1., 2. a 3. sešit časopisu »*Rondiranto*«, jenž nyní je orgánem »Bulharského spolku pro šíření Esperaneta«. V spolku zastoupeny jsou kluby esper. v Sofii, Plovdivu, Silistře, Trojanu, Plevně, Provadii a Tirnově. Předsedou je pan G. Aktardžiev v Sofii, ulice Car-Šišman, 30.

Francie. Právě byla vydána pěkná knížka »*Nuna stato de Esperanto en mondo*« v jazyce francouzském a Esperantu. Je to zpráva zvláštní komisse lyonského spolku esper., otištěná již jednou

Moravio. *El Societo esperantista en Brno.* La kunveno ĝenerala okazos la 12-an de julio ĉijare, 7½ horo vespere, en la societejo (Ferdinandská ul. 22.). Programo de l' kunveno: 1-e Raportoj de l' funkcionistoj. 2-e Elekto de l' komitato kaj revizoroj. 3-e Diversaj proponoj. — La komitato societa proponas por la venonta estraro jenajn s-ojn: Prezidanto: prof. R. Krejč; sekretario: Jan Kajš; kasisto: K. Steier; bibliotekisto: B. Závada; alsidantoj: J. Kislinger, K. Knoflíček, J. Šterc, F. Dratva, Ed. Zatezky. Revizoroj: F. Roháček, J. Quitta, Ed. Němec. — La estimata membraro estas invitata partopreni en ĉi kunveno ĝenerala aŭ persone aŭ skribe. —

Anglujo. Paroladon pri Esper faris s-o Pearson en Newcastle; en St. Andrews estas fondita klubo esper. post kurso farita de s-o James Haxton. Kelkaj gazetoj skribas favore pri Esper., precipe granda revuo »Review of Reviews«. — Firmo *Hatchard & Castarede*, London, 79, High Holborn dissendas angle kaj Esperante presitan cirkuleron, en kiu ĝi sciigas, ke ĝi eldonados monatan revuon »The Note Book« (La Notlibreto). Ĉar ĉiu Nro enhavos artikolojn esperantajn, estus dezirinde, ke ankaŭ esperantistoj fariĝu abonantoj de tiu nova revuo. — **Bulgarujo.** Eliris Nroj 1, 2 kaj 3-a de revuo »*Rondiranto*«, kiu de nun estas organo oficiala de »Bulgara societo por propagando de Esperanto«. »Societon« formas grupoj esper. en Sofio, Plovdiv, Silistra, Trojan, Pleven, Provadia kaj Tirnovo. S-o G. Aktarĝiev en Sofio, strato Car-Ŝiŝman, 30. estas ĝia prezidanto. —

Francujo. Ĵus estis eldonita en lingvoj franca kaj Esperanto »*Nuna stato de Esperanto en mondo*«, raporto de esplora komitato ĉe Liona grupo esperantista, elirinta

v časopise »Lingvo Internacia«. Má býti rozdávána návštěvníkům nedávno otevřené výstavy v Saint Louis v Americe. — Pod názvem »*Esperanta Ligilo*« vyšel prvý sešit nového časopisu pro slepce, tištěný literami systemu Brailleova. Roční předplatné 3 fr. zasíláno budiž p. Th. Cartovi, Paříž 12, rue Soufflot. — Firma Hachette & Cie v Paříži vydala nový adressář esper. »*Tutmonda Jarlibro Esperantista*« za 2 fr. V příštím čísle promluvíme o něm více.

Švédsko. Časopis *Tidning för Uppforstrare*« jest první ze švédských listů učitelských, jenž počíná všímati si bedlivěji Esp. Redaktor jeho zdá se býti velmi nakloněn Esperantu a slibuje uveřejniti všechny články, které mu zahraničnými učiteli zaslány budou. Články ony buďtež zasílány na adressu: S-o *Hugo Karlsten*, Töcksfors, Värmland, Svedujo. (Dle časop. »Lingvo Internacia«).

Německo. Pěkné články o Esperantu vyšly v berlínském časopise »*Tägliche Rundschau*« (9. VI.) od p. H. Elbelta a v květnovém čísle časop. »*Naturarzt*« od pana R. Gerlinga. Články tyto u mnohých čtenářů vzbudily zájem pro Esperanto a byly příčinou četných dotazů, které s ochotou zodpověděl klub berlínský. — Vyšla také nová propagační brožurka »*Das Weltsprachen-Problem*« od p. H. Knobela, jako zvláštní otisk z časopisu bankovních úředníků »Bankbeamten-Zeitung«. — Také ve vídeňském listě »Vorwärts« objevil se příznivý článek o Esperantu a »Klub vídeňských esperantistů« ustavil se znovu. Schůze má každý pátek o 7 hod. večer (Schaufelbergerstr. 6. I. B. Wien). Konán je také bezplatný esper. kurs.

antaŭ ne longe en revuo »Lingvo Internacia«. Ĝi estas disdonota al vizitantoj de ekspozicio en Saint Louis en Ameriko. — »*Esperanta Ligilo*« estas nomo de gazeto por blinduloj - esperantistoj; estas presita per literoj de sistemo Braille. Jaran abonon 3 fr. oni sendu al ĝia redaktoro s-o Th. Cart, Paris, 12. rue Soufflot. Firmo Hachette & Cie en Paris eldonis adresaron de esperantistoj sub nomo »*Tutmonda Jarlibro Esperantista*« por 2 fr. – Pri ĝi ni parolos pli detale en numero venonta. — **Svedujo.** Revuo »*Tidning för Uppforstrare*« estas unua el svedaj gazetoj instruistaj, kiu komencas skribi pri Esper. Ĝia redaktoro ŝajnas esti favora al Esper. kaj promesas publikigi ĉiujn artikolojn sendotajn al li de fremdaj instruistoj. Tiaj artikoloj estu sendatataj al s-o *Hugo Karlsten*, Töcksfors, Värmland, Svedujo. (El »Lingvo Internacia«). — **Germanujo.** Bonegaj artikoloj pri Esperanto aperis en jurnalo »*Tägliche Rundschau*« (9. VI.) en Berlino de s-o H. Elbelt kaj en »*Naturarzt*« (junia Nro) de s-o R. Gerling. Nomitaj artikoloj turnis atenton de multaj legantoj al Esper. Sekvo de tio estis, ke Berlina grupo devis respondi grandan nombron da petoj pri klarigoj, kion ĝi faris ĝoje. — Eliris ankaŭ nova propaganda broŝuro de s-o H. Knobel sub nomo: »*Das Weltsprachen Problem*«, aparta represo el gazeto »Bankbeamten-Zeitung« (revuo por bankoficistoj). — Ankaŭ Viena gazeto »Vorwärts« publikigis favoran artikolon pri esper. »*Viena esper. klubo*« estas nun reorganizita kaj kunsidas ĉiuvendrede je 7. horo vespere. (Schaufelbergerstrasse 6. I. B., Wien). Okazas ankaŭ senpaga kurso pri Esper.

ORGANIZACIO DE KORESPONDADO (O. K.).

Klarigo de signoj: D = donas. Dez = deziras. K = kolektas. L = legas (en lingvoj . . .). P = parolas. R = respondas. S = skribas.

Unu anonco por ĉiu abonanto de »Č. E.« estas tute senpaga.

---

76. Bohemujo (Aŭstrio). TEPLICE, Nádražní ul. č. 4. I. — frl. *Eliška Janoušková.* ***LSP***: boh., germ., Esper. ***L***: angl. ***Dez***: Korespondi pri sociala movado, pri progresoj de Esperanto, pri naturbeleco kaj pri situacio de servistinoj fremdlandaj. ***R***: Ĉiam kaj al ĉiu. Per poŝtkart. aŭ leteroj. — Mi tre deziras baldaŭ korespondi kun fremdlandanoj. * 1883.

77. Bohemujo (Aŭstrio). CHANOVICE. — *Josef Pešek*, instruisto. ***LSP:*** bohem., germ., Esper. ***R:*** Esperante. — Literoj estu ĉiam legeblaj! * 1881.

78. Bohemujo (Aŭstrio). PRAHA II, Akademícká čítárna I. p. Spálená ulice.— *Vasilije Rundo*, juristo. ***LSP:*** serb., bohem., germ., Esper. ***LS:*** lat., franc., rus., ital., bulgar., sloven. ***Dez:*** Korespondi pri politikaj kaj ekonomiaj rilatoj de diversaj nacioj, virina demando, socialismo, entute pri ĉio, kio rilatas homan kulturon. ***R:*** Tuj. — Ekligi rilatojn kun esperantistoj, kiujn mi povus dum vojaĝo viziti. * 1881.

79. Bohemujo (Aŭstrio). PRAHA-VRŠOVICE, Palackého tř. 346. — *Václav Šindelář*, lokomotivestro. ***LSP***: bohem., germ., pol. ***LS:*** Esper. * 1866.

80. Bohemujo (Aŭstrio). GROSSMERGTHAL, Nro 155. — *Josef Zosel*, fabriko laboristo. ***LSP***: germ., angl. Esper. ***Dez***: Korespondi pri naturscienco, kulturado de fruktarboj, floroj, k. t. p. ***D***: Sciigojn pri kulturado de fruktarboj kaj floroj. ***K***: Poŝtkartojn ilustr. ***R***: Laŭ deziro, per kartoj aŭ leteroj.

81. Rusujo. Estlando. NARVA, Joachimstal, Nro 80. — *Jan Tenisson*, tajloro. ***LSP***: est., Esper. ***LS***: rus., germ. ***Dez***: Korespondi Esperante pri Esperanto kaj pri enkonduko de Esper. inter simplaj metiistoj kaj laboristoj. ***D***: Sciigojn pri Narva entute, speciale al samprofesianoj pri ĉiuj laboroj en nia metio. — Deziras pruvi al skeptikuloj, ke Esper. taŭgas ne sole por scienculoj, sed ankaŭ por homoj de malalta klero. * 1864.

82. Moravio (Aŭstrio). ŽĎÁR město. — *Ant. Beneš*, ekspedisto de vagonaroj. ***LSP***: boh., germ. ***LS***: lat., Esper. ***Dez***: Korespondadi pri aferoj kaj interrilatoj de fervojoficistaro en fremdaj landoj. ***D***: Diversajn sciigojn. ***K***: Poŝtaj kart. ilustr. ***R***: Per kart. aŭ leteroj, tuj, ĉiam. * 1881.

Korekto.

Bohemujo (Aŭstrio). PRAHA, 1322-II. — *Vojtěch Kraus*, urba oficisto kaj prezidanto de grupo esperantista en Praha. ***LSP***: bohem., germ., franc., Esp. ***LS***: *angl., lat., grek., ital.* ***Dez***: Korespondi pri progresoj de Esp. ***R***: Per leteroj aŭ poŝtkartoj. * 1866.

Redaktor: Krumpholc Jos. — Vydavatel: Čejka Th.
Tiskem »Družstva knihtiskárny«, Hranice.

NOVAJ APEROJ EN LITERATURO

ESPERANTA aparte kaj INTERNACILINGVA entute.

En ĉi rubriko ni nur registrados novajn verkojn. Recenzojn pri apartaj libroj estos donataj ankaŭ plu en „Bibliografio". Ni povas raporti sole pri tiuj verkoj, kiujn ni ricevis (se eble en 2 ekz.).

Rimarko. Verkoj kun steleto (*) aperis en »Kolekto aprobita de Dro Zamenhof«.

* **Václav Sieroševski**: La fundo de l' mizero. Tradukis Kabe. 91 pĝ., 0·75 fr., Hachette & Cie, Paris, 79, boulevard Saint-Germain. — * **Prof. Léon Marissiaux**: Cours commercial d' Esperanto. 143 pĝ., 1·50 fr., Hachette & Cie, Paris. — * **Hermann Jürgensen**: Wörterbuch Esperanto-Deutsch. 220 pĝ., 1·80 Mk., Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin, Prinzenstrasse 95. Ĝis nun plej plena vortaro de Esperanto. Enhavas multe da novaj, ankoraŭ nenie uzitaj vortoj, kiuj estas aprobitaj de Dro Zamenhof. Libro tre utila por ĉiu esperantisto. Tial ni rekomendas ĝin plej varme. — * **Th. Cart kaj M. Pagnier**: L' Esperanto in dieci lezioni. Itale tradukita de Albert Gallois. 73 pĝ., 0·75 fr., Raffaello Giusti, Livorno, 53, via Vittorio Emanuele. — **Tutmonda Jarlibro Esperantista**, enhavanta la Adresarojn de Dro Zamenhof por 1904. Sub redakcio de F. de Ménil. 230 pĝ., 2 fr., Hachette & Cie, Paris. (Bedaŭrinde plenega da eraroj kaj kripligoj nerekoneblaj!) Ricevebla ĉe administracio de »Čes. Esp.« por 2 K (kun poŝta transsendo). — **Prof. A. Offret**: Nuna stato de Esperanto en la mondo. Raporto de la esplora komisio de la Liona esperantista grupo. Aparta represo el »Lingvo Internacia«, januaro 1904. 12 pĝ., 0·15 fr. Ricevebla ĉe Paul Lengyel, Szekszárd, Hungarujo aŭ ĉe »Lingvo Internacia«, Paris, 27, boulevard Arago. — **H. Knobel**: Das Weltsprachen-Problem. Separat-Abdruck aus der »Bankbeamten-Zeitung«. 13 pĝ., 10 Pfg., Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin. Bona propagandilo! — **Adresaro de la Esperantistoj**. Serio XXIV. (Novaj esperantistoj, kiuj aliĝis de 1. januaro 1903 ĝis 1. januaro 1904.) Eltiro el »Tutmonda Jarlibro Esperantista«. 32 pĝ. Ricevebla por 40 heleroj ĉe administracio de »Čes. Esp.«
